7-a JARO, N-o 333



LEIPZIG, 19. / 2. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. — GVIDANTO: E. Lanti. — SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. — ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

SKLAVECO EN LA 20-a JARCENTO


Punlaboro en la belgaj, francaj k britaj kolonioj. — Belgaj koloniaj metodoj

La internacia laborkonsilantaro en Ĝenevo estas kreinta komisionon, kiu komunikos informojn pri la laborkondiĉoj inter la indiĝenoj de l' eŭropaj kolonioj. La kaŭzo de tiu aranĝo estas la enveno de sennombraj plendoj k protestoj de ĉiaj organizoj el la tropikaj koloniaj regionoj pri la subpremo al indiĝenoj, la al ili surmetitaj impostoj k la senpovo de la eŭropaj gvidorganoj.

Rilate la krizon, kiu nuntempe regas en la eŭropaj kolonioj koncerne al supre citito, la starigo de tiu komisiono havas grandan valoron.

Laŭ la ĝis nun alvenintaj raportoj, kiuj nature ankoraŭ estas tre singarde redaktitaj k asertas nenion pozitivan, estas la ĉefimpreso tiu, ke ĝuste en la kolonioj de la grandaj ŝtatoj ekzistas la plej nekredeblaj malbonstatoj. Francio k precipe Belgio ĝuas la duban honoron esti la landoj, kie la plej senhonta elpremado k krudaj korpopunaĉoj vigle regas.

En la belga parlamento K-do Vandervelde priparolis antaŭ nelonge la kolonian politikon de la belga registaro en Kongo. Laŭ liaj komunikoj, kiuj sendepende de ĉiu influo estas certigitaj de la Belga Ruĝa Kruco k de la misi-oficejo, mortis dum la lastaj dek jaroj 80 mil Kongonegroj en sklaveco! Oni devigas ĉi tiujn malfeliĉulojn labori en kaŭĉukaj plantejoj, kie ili tre baldaŭ pereas per febro k malsato. Kiel monenspezon ili perlaboras, dum *12-hora labortago*, la atentindan sumon de *80 centimoj*, la flegokostojn tamen oni ankaŭ deprenas de iliaj "salajroj"! Oni devigas tiujn negrojn al punlaboro, ili estas trenataj de belgaj soldatoj el siaj vilaĝoj, katenataj k multfoje laborigataj je centoj da kilometroj de siaj vilaĝoj, pelataj kiel bestoj al buĉejo. Kaj tio en "civilizita" lando! Tutaj regionoj estas laŭ tiu maniero senhomigitaj. En la jaro 1928 (nur antaŭ du jaroj) forkuris pli ol 10 mil neĝroj el la limregiono de l' Kongo al Brita Ugando, por ne eniĝi lá sklavecon. Vandervelde postulis, por taŭge ŝanĝi tiujn fiajn statojn, tujan starigon de parlamenta esplorkomisiono, kiu senprokraste vojaĝus al Kongo. Ĉi tiu justa postulo estis malakceptata per la stranga deklaro, ke la kolonia estraro jam preparas raporton pri la Konga situacio k ke la raporto baldaŭ aperos en la parlamento por konatiĝo.



La Tanganjika-lago (Centra Afriko), natura limo inter belga k angla koloni-teritorio

Kvankam la situacio en la belgaj kolonioj jam estas la rekordo de elpremado, subpremado, militotributo k maljusto, ankaŭ Francion k Anglion rilate tion oni ne povas deklari senkulpaj. Jam delonge ankaŭ en Francio estas akre kritikataj de privatuloj k de registaranoj la regrimedoj de la kolonia estraro aplikataj al koloruloj.

Verŝajne vekita de la fortegaj kulpigoj de diversaj delegitoj pri la revolucio kontraŭ la franca registaro en Hindo-Ĉinio, nun subite la registaro en la patrolando estas stariginta "Laborinspekton por ĉiuj kolonioj", per kiu montriĝis, ke i. a. la kolonia estraro en Anamo k Tonkino regule transportadis grandan nombron da indiĝenoj eksterlanden por kontraktlabori tie. Ĉefe oni sendis ilin al la Sudmaraj insuloj (Oceanio). Ili estas delogataj de migruloj per falsaj antaŭdiroj (kiuj por tio pagas al la registaro fiksitan imposton po kapo) por la subskribo de kontrakto por granda nombro da jaroj. Malmultfoje revenas unu, malsana k malriĉega, sole daŭriganta sian vivon per la penso al reakirita libero. La registaro ne povis kontraŭdiri tiujn malkovrojn. Ĝi tamen deklaris sin inklina ĝis la "cedo" ne devigi en la estonto pli ol 8000 mizerulojn jare al tiu punlaboro en eksterlando.

En la Afrikaj kolonioj de Francio la situacio estas pli terura. Ĉi tie la grandegaj impostoj, kiujn speciale la indiĝenoj devas pagi, ilin tute pereigas.

En la jaroj 1926—1929 sumiĝis la t. n. "kabanimpostoj" je la fantazia sumo de 1½ miliardo da frankoj!

Por havigi al si sufiĉe da laboremuloj oni kreis por Centra Afriko specialajn "laborkondiĉojn", kiuj praktike signifas nur sklavecon por la negro.

Ĉiu negro inter 15 k 60 jaroj povas esti devigata per ordono de la guberniestro aŭ de unu el liaj oficistoj, al ĉiaj laboroj, kiujn ili komisiis.

Negro, kiu rifuzas plenumi la ordonitan laboron, estas punata per mal-

liberiga puno de 2 monatoj aŭ monpuno de 3000 frankoj, dum per tio la devo rilate al la laboro ne estas forigita. La plej granda skandalo tamen estas, ke la transportkostoj de la negroj el iliaj vilaĝoj al la laborlokoj poste estas deprenataj, kiel antaŭpago, de ilia malsat-enspezo.

Tio signifas, ke la negroj neniam eliĝas el sia sklaveco.

La leĝo de l' 4. oktobro 1929 ankaŭ en la Sudmaraj kolonioj enkondukis punlaboron por la viraj loĝantoj de Nova Kaledonio (Sudmara kolonio). Por tio la indiĝenoj estas devigataj al laborperiodo de almenaŭ 6 monatoj. Ili estas transportataj al tre malproksimaj regionoj k tie laborigataj en vastaj kokosaj plantejoj. La labortempo en tiuj plantejoj estas tage *16 horoj*. La mongajno estas fiksita je *100 frankoj monate*, de kiu sumeto la mizerulo devas pagi siajn flegokostojn k imposton. Foriro propravola de la laborloko valoras kiel forkuro k estas severe punata. Ĉiu, kiu kaptas forkurintan laborulon, ricevas premion de 25 frankoj. Estas permesite al la kontrolistoj fari severajn aranĝojn por la konservo de l' ordo. Ili abunde uzas tiujn rajtojn. Sur la aliaj Sudmaraj insuloj regas samspecaj malbonstatoj.

(Finota.)

El Apeldorna Gazeto trad. 15 700.

"EN OKCIDENTO NENIO NOVA"

La germania registaro, laŭ instigo de faŝistoj k ŝovinistoj, *malpermesis* la prezentadon de l' Remark-filmo, ĉar, kiel pretekstas la regna defendministerio, tiu filmo ofendas Germanion k ĝenas la patriotan senton[1]. La ministerio tute forgesis, ke ĝi mem prunte liveris al la usonaj filmproduktantoj germaniajn uniformojn k ekipaĵojn. La deziro de l' "nacisocialistoj" sufiĉis k ne estas hazardo, ke unu el iliaj gvidantoj, Hugenberg, posedas la grandan filmentreprenon "Ufa" k pro negoca konkurenco atakas la usonan filmon. Tiel interplektiĝas negoco k patriotismo...

En Aŭstrio la registaro longe cerbumadis pri malpermeso al tiu filmo, kvankam laŭleĝe tio estas malebla. Eĉ la registaranoj k parlamentanoj aparte vizitis la filmon por konstati, ĉu ĝi fakte estas malpermesinda aŭ ne. Poste oni malpermesis la prezentadon en la provinco, sed ne por la ĉefurbo Vieno. Tie estis anoncataj publikaj prezentadoj, sed biletojn eldonis nur socialdemokrata organizo, por eviti kunpuŝiĝojn en la kinoteatro. Nun la "hokokrucanoj" (faŝistoj) aranĝis manifestaciojn kontraŭ la filmo k kelkaj taĉmentoj de la polico devis deĵori surstrate por ŝirmi la kinovizitantojn. Ĉiuj stratoj ĉirkaŭ la koncerna kinoteatro estis baratAj k la manifestaciantoj — precipe nematuraj junuloj, kiuj persone ne spertis la militon k eĉ ne scias, kontraŭ kio ili fikrias — ne povis atingi ĝin. Ili kontentiĝis, bati kelkajn judojn promenantajn k detrui fenestrovitrojn de kafejoj. Sed oni prezentis neĝenate la filmon trifoje dum tiu vespero. Kia surprizo, kiam venontan tagon la polico subite malpermesis la pluan prezentadon. Antaŭe la faŝistoj estis provintaj ekbruligi la kinoteatron k je intereso de "trankvilo k ordo" oni ne toleris pacisman filmon, vere oni timis, ke la juna generacio vidu la veran vizaĝon de la milito. Sekvontan tagon la registaro dekretis malpermeson por tuta Aŭstrio. Tiu malpermeso estas ja neleĝa, sed al leĝoj obeu nur laboristoj... Oni ne hezitis, spertigi milionojn da homoj dum kvar jaroj ĉiujn kruelaĵojn de l' milito, sed nun la samaj potenculoj timas la influon de duhora kinoprezentado. Cenzuro, konfisko, malpermeso kontraŭ la volo de plimulto de l' popolo, subteno al kelkcent manifestaciantaj faŝistoj, kiuj neniam vidis la filmon, kontraŭ kiu ili protestas — tio estas regmetodoj en "demokrata" respubliko!

Lasta novaĵo: En la proksima ĉeĥoslovakia urbo Bratislava (Presburg) oni senĝene prezentas la filmon k la Vienanoj dum dimanĉo vojaĝas en najbaran landon por vidi ĝin. Oni eĉ aranĝas apartajn vagonarojn en eksterlandon pro kinofilmo... Ĉu ridinde?

F. S. (16 462).

[1] Komparu n-ojn 327 k 330.

Ĉu en via biblioteko jam troviĝas la originale verkita volumeto:

RUĜO KAJ BLANKO

Rakontoj, epizodoj el la sovetia nuntempo k pasinto de

Ivn

La vigla rakontmaniero allogos k kontentigos vin.

68 paĝoj Form. 11×14.

Adm. de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germ.)

Hispanio — ĝia evoluo de 1923 ĝis hodiaŭ

(Daŭrigo. Vd. no-jn 327, 330, 332.)

Lastaj agoj de Primo de Rivera

Dum la ses unuaj jaroj de l' diktatoreco, la popolo evoluis; ĝi eĉ ribelemiĝis. Sendube malsato k trompiĝoj estas utilaj vekiloj. En decembro 1929



Alfonso la XIII.

Primo de Rivera ekkonsciis jam pri sia ŝanceliĝanta situacio li vidis proksima la horon de sia falo. Sed kun nesuperebla fiero li daŭrigis kredigi al la popolo pri sia neŝancelebla, fortestaranta regado. Sed ne plu tiom fidante al la amaso, li malpli ofte aŭdigis belfrazajn dankparoladojn. Liaj diroj fariĝis kvazaŭ respondoj al demandoj de l' popolo ĉie aŭdeblaj. Antaŭe li diris k skribis: "Hispanio estas lando de prospero dank' al mi". Nun li esprimis sin: "Mi tenas la povon, ĉar la reĝo puŝis min al tio, k la ŝiparestraro k la altrangaj militestroj. Ili estas kontentaj, do mi restos reganta tiel longe kiel mi havos la fidon de tiuj, kiuj starigis min ĉe la regado." Li jam vidis, ke la inkvizicia tempo forpasis por ĉiam k la suferanta klaso vekiĝas k agadas por forigi la parazitojn.

Ĉu ŝanĝiĝos la regsistemo?

Januaro 1930. La burĝaro sendube komprenis, ke "ne estas bono, kiu ne alvenas pro malbono" (laŭ hispana proverbo). La sufer-epoko venigis al ribelpostuloj de l' proletaro. Tion vidante, artileriaj oficiroj faris siaflanke ribelon; ilin gvidis la konservativulo Sanchez-Guerra. Kvankam tiu ribelo estis kontraŭdiktatura, verŝajne ĝia ĉefa k nura celo estis eviti eblan ŝanĝon, kiu alvenus subitege, se la aferoj tiel daŭrus, sekve de ekleviĝo de l' proleta klaso.

Primo de Rivera konsideris la ribelon de l' artilerianoj (kiuj devenas el pli riĉaj familioj ol la ceteraj armeanoj) kiel efemeran okazon, naskitan

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA NOVA EPOKO" ★

de ĉiesa emo ordoni. Li kontentiĝis malliberiginte parton de la ribelintoj. Sed popolamasaj ribeloj memorigis la diktatoron k la reĝon pri tio, ke nepre necesas elpensi ion por trompi denove la popolon.

Kaj la faŝistaj subtenantoj de l' diktaturo pensadis, kion fari, aŭdante la protestajn kriojn de l' studentoj k de l' laboristoj. Kaj Primo de Rivera mem skribis en januaro 1930 jenon: "Post ses jaroj k duono da senhalta laboro mi jam estas devigata ne plu daŭrigi tiel agititan vivon. Mi jam estas maljunulo, k mia aĝo postulas de mi ripozon, kiun mi bezonegas pro mia sano. Ses jaroj k duono da senhalta laboro preskaŭ elĉerpis mian vivon, sed mi ne forlasos la postenon, ĝis mi estos plene konvinkita, ke ĉio restas en bona ordo — do, ne plu ses monatojn mi tenos la povon, dum kiu tempo mi revizios la aferojn, por ilin transdoni plenorde al pli juna anstataŭonto."

La faŝistoj ne prikalkulis la tempon laŭ la realaj cirkonstancoj, ili ne komprenis, ke la popolo malsatanta pli ol iam antaŭe ne plu estis la sama kiel eĉ en 1929, ke ĝi vekiĝis el longa letargio. Strikoj k ribeletoj oftiĝis en Hispanio.

Februaro 1930: "Registara krizo"

La ĵurnaloj grandlitere publikigas neatenditan sciigon pri registara krizo. La popolo avide legadis tiujn agrablajn informojn. Ĉiu demandis sin: kial tiu subita krizo? Primo de Rivera baldaŭ respondis: "Kara popolo, mia malsano pliakriĝas, nia reĝo vidante tiom da vero akceptis mian eksiĝpeton kune kun tiuj de miaj registaranoj." Tri tagojn poste Hispanio havis jam novan registaron. Kompreneble tiu ruzo estis jam antaŭe elpensita, la registaro tute ne ŝanĝiĝis. Ŝanĝiĝis nur personoj.

La dua diktatoro

Berenger, anstataŭinte Primon, prezentis sin kiel "demokrato", amiko de la popolo. La fidemo de l' popolo tamen dekomence estis malforta, ĉar ĝi konas iom la personon de l' generalo pro liaj agoj en Maroko. Li kiel "demokrato" ordonis neforgeseblan hombuĉadon. Milo da junuloj mortis en Maroko dum la jaro 1921 pro lia deziro. Same kiel Primo iam asertis, ke li estas vera socialisto, tiel Berenger deziris ŝajnigi sin demokrato. Tamen liaj kunregistaranoj ne estas laboristoj, sed — markizoj, generaloj k "ŝajndemokratoj". (Finota.)

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Redukto de l' salajroj en Italio ĝis 25%

Laŭ akordo inter la mastra sindikatkonfederacio k tiu de l' laboristoj la malpliiĝo de l' salajroj ne devus transpasi la proporcion de 8%. Evidente, pro samaj motivoj, la salajroj de l' kampar-laboristoj, kies kondiĉoj estas ankoraŭ pli malbonaj ol tiuj de la industriaj laboristoj, ne devus esti reduktitaj laŭ grado supera al tiu ĉi proporcio. Nun laŭ la faŝista organo "Resto del Carlino" la salajroj de l' kampar-laboristoj en la Bolonja provinco suferis jenajn malpliigojn: 14% por la salajroj ĝis 1,75 liroj hore; 17% por la salajroj ĝis 2 liroj hore; 20% k eĉ 25% por la salajroj ĝis 2,25 liroj; 18% por la virinaj salajroj ĝis 2 liroj. La "Vespera Kuriero" (Corriere della Sera) (15. jan.) sciigas, ke la kamparanaj salajroj en Lombardio estas reduktitaj je 25%. Kaj la mastroj rezervis ankoraŭ al si la rajton plimalaltigi tiujn "malsat"-pagojn. Laŭ "Italia".

La laborista batalo en Argentino

La diktatoro Uniburo per teroro respondis al la kreskanta kontraŭstaro de la laboristaro. En la karceroj liaj subuloj torturas la malliberulojn. Du italajn laboristojn li liveris al Musolini, deportigante ilin al Italio. En Avelaneda, industria centro ne malproksima de Buenos-Ajres, du junuloj estas paf-ekzekutitaj laŭ ordono de l' majoro Rozasko. Aliaj arestitoj malaperis k oni ne scias, kio el ili fariĝis. Sed neniam la paralizo de l' haveno de Buenos-Ajres estis tiom kompleta, kiom dum la striktagoj de l' 21. k 22. oktobro 1930. La studentoj solidariĝis kun la laboristoj, k manifestaciis kontraŭ la milit-leĝo, arestoj k deportoj. En Argentino ekzistas nuntempe pli ol 600 mil senlaboruloj, kiuj malsatas. Tamen la greno abundas;

Pri la konfeso de Mikaelo Bakunin

(el la Petropaŭla fortikaĵo al caro Nikolao la I.)

A. S. (10 580)

(1. daŭrigo. Vd. n-o 332.)

Bakunin partoprenis la polan sekcion. Jen la esenco de liaj paroloj:

"Kial vi venis al Prago? Por ĉi tie konversacii pri viaj provincaj interesoj? Aŭ por ĉiujn privatajn aferojn de la slavaj popoloj, iliajn interesojn, postulojn k problemojn kunfandi en solan, nedisigeblan, grandan slavan problemon? Okupu vin fine pri ĝi k submetu ĉiujn privatajn interesojn al la slava afero. Nia kunveno estas la unua slava kunveno, ni devas ĉi tie meti la fundamentan ŝtonon por la nova slava komuno, proklami k plifortigi la unuon de ĉiuj slavaj gentoj, kiuj de nun fariĝis nedividebla granda politika korpo.

"Unue ni devas nin demandi, ĉu nia kunveno estas nur kunveno de la aŭstriaj avoj, aŭ ĉu ĝi estas slava kunveno entute? Kion signifas la esprimo: aŭstriaj slavoj? Ĉu la slavoj vivantaj en Aŭstrio? Tiam do prefere: la slavoj, servutigitaj de la aŭstriaj germanoj. Se vi volas vian kunvenon ekskluzive limigi al la reprezentantoj de la aŭstriaj slavoj, per kiu pravo vi nomas ĝin slava kunveno? Vi esceptas ĉiujn slavojn de la rusa regno, krome ankaŭ la prusiajn k turkiajn slavojn. La malplimulto esceptas la egan plimulton k kuraĝas sin nomi slava! Do nomu vin germaniaj slavoj k vian kongreson kongreso de la germaniaj servutuloj, sed ne slava kongreso."

"La slava unuo, la slava libero, la slava renaskiĝo nur eblas post plena detruo al la aŭstria imperio."

"Ne malpli eraras tiuj, kiuj per starigo de la slava sendependeco esperas la helpon de la rusa caro. La rusa caro faris novan intiman interligon kun la Habsburganoj k ne por, sed kontraŭ vin, ne por vin helpi, sed por vin perforte rekonduki, vin, tiel same kiel ĉiujn aliajn ribelajn aŭstriajn regnanojn rekonduki en la malnovan subulecon, en la malnovan servutecon. Caro Nikolao havas simpation nek por la libero de la popolo nek por la konstitucio; en Polio vi havas la plej trafan ekzemplon! Mi scias, ke la rusa registaro vin samkiel la turkajn slavojn prilaboras k disvastigas inter vi tut-slavajn ideojn per siaj agentoj, kiuj travojaĝas la tutajn slavajn landojn. Ĝi trompas vin per la espero je baldaŭa helpo, je kvazaŭe proksima liberigo de ĉiuj slavoj per la potenca rusa Cario. Ĉu vi volas atendi ĝis tio? Neniu el ni ĝisvivos tiun horon. Ne nur vi solaj, ne, ĉiuj slavaj popoloj povus atendi ĝis neniamtago. Nun por vi jam ne estas loko en la rusa Cario: vi volas vivon, sed jen regas la silento de la tombejo; vi postulas sendependecon k movon, jen regas meĥanika obeo. Vi deziras releviĝon, ribelon, klerigadon, liberigon, sed jen regas morto, mallumo k sklaveco. En la Rusio de la caro Nikolao ĉia popolvivo, ĉia libero estus neĉerkita. Fakte sen Rusio estas ebla neniu slava unuo, neniu slava potenco; sed sensence estus, atendi savon k helpon por la slavoj de la nuna Rusio. Kio restas al vi? Unuigu vin unue ekster Rusio, ne esceptante ĝin, sed en la espero, en la atendo je ĝia baldaŭa liberiĝo. Via ekzemplo ekfajrumos ĝin, k vi estos la liberigantoj de la rusa popolo, kiu tiam siaflanke estos via forto k via ŝirmilo. Unuigu vin k de-

oni eĉ nutras per ĝi la vaporkaldronegojn! *Laŭ J. Leono.*

Grandaj rikoltoj — ne por malsatuloj (Kanado)

Ĉe la 51. kunsido de l' Administra Konsilantaro de la Labor-oficejo en Ĝenevo s-o Batler (Butler) raportis pri siaj vojaĝ-observoj en Kanado. Li kontrastigas la akutan mizeron en Okcidenta Kanado, ŝuldatan al la neeblo disvendi la grenon je profitdonaj prezoj, k la ekziston en Eŭropo de milionoj da gesenlaboruloj, kiuj havas tro malmulte da pano, ĉar mono al ili mankas por ĝin aĉeti. Li rimarkigis, ke Eŭropo povus produkti, kion Kanado bezonas k ĉi lasta povus liveri la grenon interŝanĝe. Sed nuntempe ŝajne ne ekzistas rimedoj por starigi ekvilibron inter la vendbezono de Kanado k la aĉetbezono de Eŭropo... Pli frapantan ekzemplon oni apenaŭ povas trovi pri la eŭrop-amerika interdependo k la kompleta malfunkciigo en la internacia komerco, kiu hodiaŭ paralizas la mondon. *Komunikis 3398.*

La teroro en Polio

Tricent kvindek delegitoj, la tuta nombro da partoprenintoj ĉe kongreso de socialistoj-maldekstruloj en Lodz, estas arestitaj en la momento, kiam estis voĉdonataj rezolucioj kontraŭ la registaro de Pilsudski (3. febr.). La polico sendis spionojn en tiun nepublikan kunvenon, kiuj observis la diskutadon k uzis la unuan prezentiĝantan okazon por rezultigi la arestadon pro "kontraŭŝtata konspiro". *P.*

LA KOLEKTIVIGO EN U.S.S.R.
LAŬ FEDOR GLADKOV

(3. daŭrigo. Vd. n-ojn 330, 331, 332.)

Mi memoras ĝemegadojn de aktiva homo en la kolĥozo. Li esprimas tre interesan ideon, kiu karakterizas la nunan situacion en multaj kolektivaj bienoj.

Kiam ni havis malfacilaĵojn, kiam necesis batali por la kolĥozoj, eĉ per armiloj, ni eliris kiel unu sola viro k ni plene venkis. Ĉiuj ni estis ardemaj k sciis kiel k kial. Nun kiam estas trankvile k ĉiaspecaj agitadoj estas aktualaj, ŝajnas kvazaŭ la diablo botfrapus la malantaŭaĵon al ĉiuj: ili marŝas ĉiuj turnadante la postaĵon.

Tamen la "Agitprop" de l' kulakoj varbas obstine per ĉiuj rimedoj k ĉiuj agmanieroj.

Ĉe ni la kulakoj agas ĉie milfoje pli bone ol ni, rediras senĉese la aktivaj anoj de la kolĥozoj; ili scias perfekte, kiel oni devas alparoli la "muĵik" k la "baba"[1], kiel, per kio ilin plenakiri por si. La kulako akcentas la materiajn interesojn, uzas lerte la vorton: libero. Li intime alkroĉiĝas vin.

Nu, ĝuste tiun intiman alkroĉiĝon la organizoj, la politikaj aktivuloj ne scias aŭ ne volas plenumi inter la amaso de l' kolĥoz-loĝantoj. Senpovo, malsperto, nesufiĉa preparado, manko de metodo en la socia aktiveco, manko de morala influo, malamika sento por la "eksterlandaj homoj", izolo en la mallarĝa rondo de la vilaĝaj interesoj, jen estas la ĉefaj malbonoj, kiujn suferas la gvidantoj. Ne estas mirinde, ĉar ne estas pli ol 40% de la personaro, kiu prezentiĝas al la laboro; krome, tiuj 40% konsistigas la plej "konscian" parton. Ĉiu penas komence rikolti la kampojn, kiujn li mem prisemis; ĉiu formulas unue, kiel depostulon, la tujan transdonon de sia porcio; nepra kondiĉo por daŭrigi la laboron. Tiu porcio estas diverse fiksata de la loĝantoj; la unuaj taksas ĝin je 327 kilogramoj po konsumanto; aliaj je 409 kg. Ili ne volas aŭdi pri 294,84 kg, porcio fiksita de la regiona direkcio. Ili ne estas kontentaj pri partaj pagoj de 160 kg: estas la tuto, kiun ili volas. Okazas pri tiu punkto aĝiotad-febro: la ricevata parta pago estas de iuj ĵetata sur la merkaton k estas vendata je 7 rubloj po 16,38 kg. Nature, tio senkuraĝigas la aliajn anojn de la kolĥozo.

La gvidantoj opinias, ke oni devas apliki kiel sanigrimedon severan elpurigon de la kolĥozanoj. Certe, la plejmulto el tiuj anoj estas infektita, estas multaj drinkuloj, mallaboremuloj, fuŝuloj, kanajloj k rektaj agentoj de la kulakoj. Sed tiu meĥanika agmaniero ne solvas ankoraŭ la problemon de la plifortigo de l' solidaro ĉe la kolĥozloĝantoj, de disciplin-

[1] baba = kamparanino, en familia senco.

---

klaru, ke vi estas slavoj k ne aŭstroj, kiuj en la t. n. aŭstra imperio vivas sur slava teritorio, ke vi kunvenis en Prago, por meti la unuan fundamentan ŝtonon por estonta libera k granda federacio el ĉiuj slavaj popoloj, k ke vi en la espero de kunligo de ĉiuj slavaj fratoj en Rusio, en la prusaj regionoj k Turkio — ke vi ĉeĥoj, poloj, moravianoj el Galicio k Krakovio, malgrandrusoj, silezianoj, slovakoj, serboj, slovenoj, kroatoj k dalmatoj faris firman k nedisigeblan defend- k atak-interligon."

"Mi konfesas, REGANTO, ke mi, prezentante tiun ĉi projekton al la 'slava kongreso' celis la plenan detruon al la aŭstra monarkio.' — 'Mia alia k ĉefa celo estis, en la unuiĝo de l' slavoj serĉi elirpunkton por larĝa revolucia propagando en Rusio, por komenci la batalon kontraŭ vi, REGANTO. Al la germanoj mi ne povis min aligi: tio signifus la militon eŭropan, k kio estus ankoraŭ pli terura, la militon de Germanio kontraŭ Rusio; al la poloj mi same ne povis aliĝi; ili malmulte fidis al mi, k ĉar mi ekkonis ilian nacikarakteron, ilian nesanigeblan, kvankam al mi historie kompreneblan egoismon, tiam iĝis al mi tute neeble ekinterrilati kun ili k kune kun ili agi kontraŭ mia patrolando. Sed la Slavan Unuiĝon mi konsideris ankoraŭ pli ampleksa patrolando, en kiu poloj k ĉeĥoj al Rusio, aliĝinta al ĝi, devus cedi la unuan lokon."

Bakunin ĉi tie priskribas la staton en Rusio laŭ maniero, ke Vjaĉeslav Polonski skribis: "Kun certo oni povas diri, ke nek antaŭ nek post la Konfeso de Bakunin la tirano iam ree aŭdis tiajn verojn."

"Unuvorte, REGANTO, mi konvinkiĝis, ke Rusio por savi sian honoron k estonton, devus fari revolucion k detrui VIAN caran potencon; ke ĝi per la forigo de la monarkia regformo sin devus liberigi el la servuteco en la propra lando k ekstari ĉe la supro de la slava movado, por uzi siajn armilojn kontraŭ la aŭstran imperiestron, la prusan reĝon k la turkan sultanon, se necesus, ankaŭ kontraŭ Germanio k Hungario, resume, kontraŭ la tuta mondo, por liberigi ĉiujn slavojn el fremda jugo. Duona Prusa Silezio, la pli granda parto de (provincoj) Okcidenta k Orienta Prusio, do ĉiuj slave k pole parolantaj teritorioj, estu disigitaj de Germanio. Mia fantazio eĉ pluiris: mi kredis k esperis, ke la hungara nacio, devigita pro la cirkonstancoj, pro sia izola lokiĝo inter slavaj gentoj, krome pro sia pli orienta ol okcidenta naturo — ke ĉiuj moldavanoj k valaĥoj k fine eĉ ankaŭ la grekoj aliĝus al la Slava Unuiĝo, k tiel estiĝus ununura, libera, orienta imperio, nova orienta ŝtatego en kontraŭo, kvankam ne en malamikeco al la okcidenta; ĝia ĉefurbo estus Konstantinoplo."

(Daŭrigota.)

Ĵus aperis la

februara kajero de

LA NOVA EPOKO

monata literatur-scienca revuo de SAT

kun interesa artikolo pri la literaturo de l' ciganoj en Sovetio, versoj ktp.

La lab. esperanta movado antaŭmilita.

Unuopa n-o: 0,35 mk. g.

Abonu ĉe

ADMINISTRACIO DE SAT, LEIPZIG O 27.

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO
N-o 21. — REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT. — Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22
Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

El Informletero n-o 6 de Centra Konsilantaro de Militantaj Ateistoj en USSR, Moskvo, Sretenka 10.

TUTSOVETIA VIRINA KONTRAŬRELIGIA KONFERENCO

En fino de decembro okazis la unua tutsovetia konferenco de kontraŭreligiulinoj k kult-armeaninoj (aktivulinoj de kultura fronto). Ĉi tiu konferenco estis la unua interŝanĝo de sperto inter kontraŭreligiulinoj k kultarmeaninoj de tuta USSR. Ĝin ĉeestis 160 personoj, plejparte laboristinoj k kolĥoz-aninoj. La konferenco akceptis kelkajn decidojn k montris praktikajn vojojn al fortigo de kontraŭreligia laboro inter virinoj. En ĉi tiu agado oni devas konsideri k atenti la kompare pli malgrandan socipolitikan k teknikan kleron de l' tuta amaso da virina loĝantaro, ligitecon de la virino per familiaj kondiĉoj, ŝian pli grandan, dependan de ĉi tiuj k kelkaj aliaj kaŭzoj konservativemon en religiaj demandoj.

La konferenco esprimis neceson krei specialan virinan kontraŭreligian filmon k montris neceson utiligi sovetfakojn de registrado de civitanstataj aktoj (edziĝo, naskiĝo ktp.), societo por protektado al patrinoj k suĉinfanoj k de "punktoj" de analfabetlikvidado por kontraŭreligia laboro.

En tuta tiu laboro precipe devas esti priatentataj demandoj pri rekonstruo de l' vivmaniero: aktivulinojateistinoj devas esti iniciatantoj k organizantoj de infan-institucioj, tolaĵlavejoj, komunmanĝejoj k instaloj helpantaj al plibonigo de kulturaj kondiĉoj de l' laborula virino.

La kontraŭreligia laboro en lernejo devas esti firme ligita kun laboro inter gepatroj, ankaŭ devas esti aktivigita la kontraŭreligia laboro en bibliotekoj.

Al C. K. de U.M.A. (Militantaj Ateistoj) oni proponis organizi regulan aperigon de "ateistina folio" en gazeto "Bezboĵnik" Oni devas priatenti utilon de aliaj periodaj ateistaj eldonaĵoj k de specialaj virinaj revuoj por la klarigo de problemoj pri kontraŭreligia laboro inter virinoj.

Organoj de U.M.A. devas esti fortigitaj de virinoj-aktivulinoj, rekomenditaj por gvidlaboro en U.M.A. Plej grave devas esti atentata la el-kreskigo de virina aktivularo.

Kontraŭreligiaj muzeoj en USSR

Centra kontraŭreligia Muzeo en Moskvo vaste disvolvis sian laboron. Dum unu jaro (de 1. novembro 1929 ĝis 1. novembro 1930) la muzeo akceptis 234 716 vizitantojn (el ili 3 330 ekskursaj grupoj kun 130 059 partoprenintoj k 104 657 izoluloj).

Granda kontraŭreligia muzeo en USSR estas ĵus malfermita de Leningrada landparta konsilantaro de UMA en estinta katedralo je nomo de Isaako.

Vastan kontraŭreligian laboron efektivigas la tutukrainia muzea urbeto: estinta Kieva "Lavro" (unuaranga

---

restarigo. Konsiderante la malviglan edukaktivecon ĉe la amasoj, tiu rimedo pendigas gravajn konsekvencojn super la tuta kolĥoz-ekzistado.

La tribunaloj el K-doj, organizitaj ĉe la kolĥozoj, estas neaktivaj k ĝuas nenian konfidon. La tribunalprezidanto havas, ĝenerale, tro multe da laboro en la ekonomia fako; li ne havas tempon ekzameni la diversajn kazojn. Tiu socia aktiveco estas por li devigo, kiun li celas kiom plej eble eviti. Tio maltrankviligas la homojn de la kolĥozoj: ili postulas insiste reorganizadon de tiu grava socia funkcio. Unue, la tribunalprezidanto devus esti liberigata de ĉiu okupo en la ekonomio k ricevi salajron; efektive, la procesoj estas multnombraj: gravaj ofendoj al la disciplino, intenca fuŝado, kanajlagado, ktp. La malriĉaj kamparanoj k la kamparanaj taglaboristoj formas la plej malprogreseman parton el la amaso de l' kolĥozloĝantoj. Estas la mezaj kamparanoj, kiuj konsistigas la plej kapablan k plej disciplinan grupon por la laboro. Sed tiuj malŝanĝiĝemaj elementoj konsideras la malriĉajn kamparanojn k la taglaboristojn kiel parazitaĉojn. Tiu antagonismo ne estas forigata, tiom pli ke la simpatio de la agemaj batalantoj prefere iras al la mezaj kamparanoj. Malgraŭ ke oni senĉese ripetadas la vortojn "malriĉaj kamparanoj" k "kamparanaj taglaboristoj", reale tiuj ĉi vivas izolaj. Mi diras denove: inter la amasoj ne estas efektiva aktiveco. Tio estas la fundamenta malvirto. Jen tiel oni juĝas, entute, la du kontraŭajn partojn: la meza kamparano bone laboras, la malriĉa kamparano k la taglaboristo malbone laboras.

Grandaj difektoj estas kaŭzataj de la indiferenta k nur formala sinteno pri la intenca fuŝado, kiun adoptas la agemaj batalantoj, same kiel la sovetiaj institucioj de kriminala enketo. Ekzemple, bruligantoj promenas libere; la brulegoj estas konsiderataj kiel sensignifaj epizodoj. Bruligantoj en la stanico (vilaĝo) Novomalorosijsk, senditaj al la regiona direkcio, estis liberigataj de ĉi tiu. Ili promenas arogante sur la stratoj k rikanas. En la stanico Novograjdansk, la kulakoj k iliaj policanoj regas per teruro la kolĥozloĝantojn. La malliberuloj estas liberigataj k plue agas per pli intensa energio. Oni povus citi multe da similaj ekzemploj. La konferencoj pri produktado laboras tiel malbone. Ili apartiĝis de la amasoj: kutime la agemaj batalantoj k la delegitoj nur kunvenas. La amaso ne scias, kiaj estas la aferoj, kiujn ili ekzamenas.

La kooperaj societoj estas la ŝtono por ekpuŝi la debaton. Ili estas la sola konversaci-temo. Kiaj ajn estas la demandoj, kiuj subite ŝprucas, la diskuto neeviteble estas revenigata al la aktiveco de la kooperaj socioj. La provizumo al la kamparo ne plu progresas. Estas la "plej malforta" punkto en la kolĥozmovado. Neniom da ŝtofoj, petrolo, sapo, piedvestoj: manko, ĝenerale, de ĉiuj produktoj, kiujn la kamparanoj plej multe bezonas. La komercaĵoj alvenas puŝo-postpuŝo, laŭ neorganizita maniero, po unu plenkulero monate. Estas vere, ke ĉiuj konas la malfacilaĵojn; sed neniu volas atendi. Kutime oni aplikas jenan agmanieron: se kamparanoj liveras la grenon abunde k antaŭ la templimo, ili ricevas antaŭ la fikstempo mezbonan provizumon. Kiuj transdonas la kontrakte fiksatajn kvantojn da viando, tiuj ricevas, pluse al la mona ekvivalento, du rublojn da industriaj produktoj.

Necesas fundamente reorganizi la labormetodon en la kolĥozoj. Necesas ĉiujn fortojn mobilizi por ĉiujn ĉi danĝerojn k ĉiujn ĉi malfortajn punktojn forigi. Necesas zorgi pri tiuj traboroj, ilin juĝi laŭ ilia ekzakta valoro, por poste pli rapide progresi. Se ne okazas decidaj ŝanĝoj en tiu punkto, ne ebla estos fruktodona laboro por plifirmigi la movadon pri kolektivigo, por en la kolĥozoj kuntreni la malplimulton, kiu ankoraŭ kontentiĝas per la privata ekonomio. Tiuj kamparanoj malmultvorte respondas, kiam oni al ili demandas, kial ili ne aliĝas al la kolektivaj bienoj:

— Ho! ni, ni atendos; ni konstatos tion, kio rezultos, kiel tio funkcios. Ne estas kaŭzo por rapidiĝi. (Finota.)

Trad. la Alĝera Esperantista Grupo.

monaĥejo). Dum unu jaro, depost oktobro 1929, la muzeo akceptis 198 000 vizitantojn (kontraŭ 72 000 dum pasinta jaro).

Grandegan kontraŭreligian laboron ankaŭ efektivigas tra USSR lokaj kontraŭreligiaj muzeoj k kontraŭreligiaj fakoj de lokaj muzeoj. Multnombraj informoj konstatas, ke vizit-elcento al kontraŭreligiaj muzeoj okupas inter ĉiuj muzeoj la unuan lokon.

Migrantaj kontraŭreligiaj ekspozicioj

En 1930 Centra kontraŭreligia Muzeo en Moskvo organizis 6 migrantajn kontraŭreligiajn ekspoziciojn, kiuj estis direktitaj al diversaj partoj de USSR, k krom tiuj 9 pri iuj temoj ekspoziciojn (por kongreso k agitado), uzitajn parte senpere en la Muzeo mem, parte direktitajn kun speciala destino.

La migrantaj ekspozicioj faras longedaŭrajn veturadojn tra diversaj partoj de USSR priservante vastajn amasojn da laboristoj k kamparanoj. La ekspozicioj estas akompanataj de kvalifikitaj lektoroj de CK de UMA.

La ekspozicioj kutime elvokas grandan intereson ĉe la amasoj k helpas plivigligon de kontraŭreligia laboro en periferio.

En religi-kulaka tendaro

Kiel antaŭe plejajn fortostreĉojn en sia batalo kontraŭ la socialisma konstruado la religi-kulaka kontraŭsoveta tendaro direktas por malhelpi konstruadon k laboron de kolĥozoj, kontraŭ la aranĝoj de l' soveta potenco por sufiĉa liverado al Sovetlando de pano k ceteraj nutraĵproduktoj.

En Ŝadrinska distrikto de Urala landparto eklezianoj forte admonas kredantojn eliri el kolĥozo, promesante "la unuan lokon en paradizo al tiuj, kiuj forlasos la kolĥozojn k konsilos fari la samon al kamaradoj".

En vilaĝo Kamenskaja de Petuĥa distrikto (Urala landparto) la kulakoj timigas la malkleran kredantan loĝantaron per fabeloj pri tio, ke en kontoron de apuda kolĥozo dumnokte alflugas "nigra serpento havanta grandegajn flugilojn k akrajn ungegojn".

En kolĥozo je nomo de Iljiĉ (Ĉerkasa distrikto de malsupra Volgalando) sektanoj provis malhelpi laboron de nove-liveritaj traktoroj, verŝante en benzinon malpuran akvon k difektante magneton. Tiel kulakoj celis ĝustigi siajn profetaĵojn, ke dio ne permesos "al kontraŭkristaj maŝinoj" kulturi ateistan kolĥozan teron. La traktoroj estis restarigitaj k sukcese plugis kolĥozajn areojn; al religi-kulakaj fabeloj estis farita decida bato.

En vilaĝo Pirma de l' Koĉkurova distrikto en Mordva aŭtonoma lando monaĥino disvastigis famojn pri tio, ke al ŝi aperis en sonĝo "sankta Serafimo de Sarovo" k avertis, ke ĉiujn, kiuj aliĝos al kolĥozo, mortigos fajra pluvo.

En vilaĝo Muraevo de l' Milislava distrikto en Moskva lando agitis kontraŭ kolektivigo en la vilaĝon veninta pilgrimo. Laŭ liaj diroj kolĥozo malriĉuligis cent familiojn, enkalkulante ankaŭ sian. "Ne kolerigu dion, vokis la pilgrimo, ne aliĝu al diabla kolĥozo, ĉar tiel same vi iros en mondo kun almozulsako". Oni eksciis, ke la pilgrimo neniam estis kolĥozano, sed ĝis lasta tempo servis kiel psalmanto en unu el la preĝejoj, kiujn likvidis en kolĥozo unuiĝintaj vilaĝanoj.

Furiozan agitadon aranĝas eklezianoj k sektanoj kontraŭ vasta partopreno de laboruloj en agitado por reelekto de sovetoj. Ekz., en Novozibkova distrikto de okcidenta landparto pastroj konvinkas kredantajn virinojn ne viziti reelektajn kunvenojn, ĉar ili estas malplaĉaj por dio k partoprenontoj en ĝi suferos en "transmondo" gravegan punon.

Pastro de l' vilaĝo Tiĥonovo en Ivanova landparto de preĝeja katedro vokis al kredantoj: "Ne iru al reelektoj. Printempe Francio militos kontraŭ Sovetojn k severege punos Sovetanojn".

Revoluciemaj Ateistoj Tutmondaj

Meze de marto (13-an k sekvantajn tagojn) okazos en Germanio la regna kongreso de proletaj liberpensuloj. La 14-an de marto ni malfermas nian IFA-Kulturschau (Ekspozicio de Interes-societo por Laborista Kulturo), kiun partoprenos la organizoj de liberpensuloj, esperantistoj, radio- k foto-amatoroj, agitproptrupoj, marksisma laborist-lernejo, artistoj: pentristoj, aktoroj, revoluciemaj verkistoj, libro-eldonejoj ktp. Liberpensul-kongreso k ekspozicio okazos en Lajpcig.

Fortigu per alsendo de viaj batalsalutoj, per letero, poŝtkarto aŭ telegramo en esperanto la batalon, kiun gvidas la revoluciemaj liberpensuloj k la aliaj kulturorganizoj laboristaj kontraŭ reakcio k faŝismo. Aldonu al viaj skribaĵoj koncizan raporton pri viaj lokaj cirkonstancoj kun bildoj. Ni publikigos ĉion resume en taggazeto k Proleta Liberpensula Voĉo. Sendu ĉion ĝis 12-a de marto al: Rudolf Hartig, Leipzig S 3, Arndtstrasse 43 (Sub nomo Hartig skribu: Por Reichskongress)

TRA ESPERANTIO

Resuma raporto pri la jaro 1930 de la Federacio de Lab. Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo

La pasinta jaro ne estis senvalora por la nederlanda laborist-esperantista movado. La Federacio de lab. esperantistoj plifortiĝis. La jaron 1930 ĝi eniris kun 22 sekcioj, kiuj havis 380 membrojn, k krome kun 30 ĝeneralaj membroj en lokoj, kie ne estas sekcio de la Federacio. Plie estas enskribitaj 32 simpatiantaj membroj k 9 simp. organizoj. Sen la organizoj, la Federacio nombris 442 membrojn. La jaron 1931 ĝi eniris kun 37 sekcioj nombrantaj 780 membrojn, krome kun 70 ĝeneralaj membroj, 260 simpatiantaj membroj k 23 simp. organizoj, sume (sen la simp. organizoj) 1110 membroj. La kreskado en la lastaj jaroj daŭris ĝojige. Ci-jare ekfunkciis 50 kursoj, kiujn sume partoprenis pli ol 1300 kursanoj; dum ekster la Federacio estis aranĝitaj kun la helpo aŭ almenaŭ per ia kontakto kun la Federacio 9 porlaboristaj kursoj, kiuj nombris sume 200 kursanojn.

Nia organo havis en la komenco de la jaro 1930 eldonkvanton de 1000 ekzempleroj, dum en ĉi tiu jaro la eldonkvanto plialtiĝis ĝis 2000, do duobliĝis. Estas ĝojiga fakto, ke efektiviĝis la pli ofta apero de nia organo: En la jaro 1931 ĝi aperas ĉiu-dekkvartage en pli granda formato (la sama formato kiel "S-ulo"). En la jaro 1930 ĝi regule aperis ĉiumonate, k estis aldonita la ĉiumonata gazeto "La Lernanto". Sume ni donis 202 paĝojn (formato "La Lernanto").

Ni en kunlaboro kun la aliaj nederlandaj esperantist-organizoj prizorgis gazetar-servon, kiu bone funkciis k per kiu ni publikigis poresp-ajn komunikojn en la nederlanda gazetaro bonefike. Per tiu servo estis publikigitaj 2060 artikoloj en 880 gazetoj.

La "Konvencio" estis laŭpove plenumata: dum tiu ĉi jaro multajn el niaj anoj ni aligis al SAT; bedaŭrinde, ankoraŭ ne ĉiuj niaj anoj trovis la vojon al SAT. Same ankoraŭ ne ĉiuj SAT-anoj holandaj sentas la neceson: "ĉiuj laboristoj estu en unu laborista organizo."

Ĉiel ni klopodis propagandi. Krom nia valora organo ni eldonis 51 000 propagandaĵojn, kiuj en la antaŭa jaro estis disdonataj. Ni aranĝis 10 poresp-ajn ekspoziciojn, kiuj estis bonege vizititaj k precipe celis antaŭpreparon por la kursoj. Ni partoprenis kelkajn laboristajn manifestaciojn, en kiuj ni per flagoj k tukoj kun devizoj propagandis por esp-o. En Amsterdamo, en la manifestacio kontraŭ la ŝiparleĝo ni

bonefike per parolĥoro direktis la publikan atenton al nia movado. Ĉi tiu manifestacio en Amsterdamo estis partoprenata de pli ol 80 000 personoj (dum en aliaj lokoj samtempe okazis samspecaj manifestacioj). Bona propagando estis denove la disaŭdigo per radio de niaj t. n. kvaronhoretoj. Per la V. A. R. A. (Asocio por Laboristaj Radio-amatoroj) ni sukcesis plenumi tiun taskon. Ni klopodis efektivigi aranĝon de esp-a kurso per radio; bedaŭrinde pro malfavoraj cirkonstancoj ni ne sukcesis, tamen en 1931 ni plue daŭrigas niajn klopodojn. Nian kongreson ni tenis en Utreĥto; ĝi estis grandsignifa k bone vizitita.

Resume, la jaro 1930 estis bona instigilo al plua laboro, kiu kondukas nin al historia fakto, al la jubileo de l' dudekjara ekzisto de nia Federacio.

La sekretario.

POR LA KONSERVO DE SAT

Multnombraj estas la rezolucioj, kiujn ni ricevis lastatempe, similaj al ĉi tiu sube presita de la Bruselaj SAT-anoj. Manko de loko malpermesas represi ilin ĉi tie. Tamen ni mencios sube la kolektivajn rezoluciojn kun fid-esprimo. Ni volas rimarkigi ankaŭ, ke ni ricevis nombron da individuaj leteroj, kiuj kuraĝigas nin k deziras al ni sukceson en la klopodado konservi la ĝisnunan SAT. Menciinde estas, ke siaflanke la Kontrol-Komitato ricevis multajn leterojn kolektivajn k individuajn, kiuj postulas la eksigon al la subfosantoj.

REZOLUCIO

La subskribintaj SAT-anoj, post debato okazinta dum kunvenoj regule kunvokitaj en kafejo "A la Renommée" en Bruselo, la 15. k 22. januaro 1931, konsiderante unuparte:

a) ke la reviziistoj troviĝas en vicoj de opoziciularo k ne ĉe Direkcio,

b) ke revizio — en si mem — ne estas kondamninda, sed ke ĝi devas efektiviĝi per honestaj metodoj,

c) ke reviziistoj devas kuraĝi konfesi sian revizideziron k ne kulpigi aliujn per siaj propraj agoj.

Konsiderante aliparte:

1. ke SAT-gvidantoj ne deflankiĝis de la du gravaj principaj bazoj de SAT: *Klasbatalo* k *supertendenceco*,

2. ke forigon de Esp. Servo el "S-ulo" k ĉesigon de akcepto de abonoj-aliĝoj-mendoj el Sovetio diktis neeltenebla financa situacio k nekapablo, fare de sovetiaj K-doj, akurate forigi la krediton en Moskvo pertiea libroeldonado.

3. ke la komfrakciaj ĉefoj — SAT-anoj — faris la unuajn paŝojn al skismigo de SAT per kreo de "Internacisto", de "Ekrelo" k preparo de Kongreso de Revol. Esp-istoj en Moskvo kun celo krei skismigan tutmondan asocion;

decidas adresi sian fidesprimon al SAT-Direkcio.

L. Springael (1729), Jos. Lebacq (7297), L. Petit (9766), L. Suy (8274), E. Weyarel (16 974), J. Urlich (10 049), L. Trebitsch (12 565), H. van Vynckt (616), J. Bracops (1999), E. Chapelier (9106), G. Stalens (5895), Maurin (16 971), Glineur (469), M. Van Aelst (155), L. André (14 897). (Krom du el la subskribintaj K-doj ĉiuj pagis sian aktivan kotizon por 1931.)

Rezoluciojn samsencajn ni ricevis plie de: *SAT-anoj en Stokholmo* (Svedio) — subskribis 12 K-doj; en *Ljono* (Francio) — unuanime akceptita; en *Duseldorf* (Germ.) — per 10 voĉoj kontraŭ 2 k 3 sindetenoj; en *Lajpcig* — subskribis 13 K-doj*; *Viljuif* (Francio) — 2 K-doj.

Pri "voĉoj el Sovetio"

Kelkaj K-doj esprimis sian dubon pri la aŭtentiko de la poŝtkarto, kies tekston ni publikigis en la n-o 330 de "S-ulo". Ni do sciigu, ke ni tenas zorge la originalon k sekve povas konvinki per fakto la dubemulojn. Ni aldiru, ke ni posedas multan alian similan materialon, kiu pruvas plej nerefuteble, ke multaj rezolucioj voĉdonitaj en Sovetio estas . . . tute senvaloraj. Unu K-do eĉ skribis por peti pardonon, ke lia nomo troviĝas sub iu rezolucio, sed rifuzi li ne povis.

Sed estas evidente, ke nur la C. K. de SEU, kiu denuncis "S-ulo"n kiel "kontraŭrevolucian" organon kulpas k respondecas pri tia stato. Malgraŭ ĉio ni daŭrigos kiel estinte defendi la Sovetian laboristaron kontraŭ ĝiaj malamikoj.

Vortoj kaj agoj!

En la n-o 320 de "S-ulo" ni sciigis, ke dank' al la klopodoj de nia presejo estis atingata la permeso ekde januaro sendi al Lajpcig ĉiumonate 1000 markojn germanajn, por tiel iom post iom likvidi la ŝuldon de C. K. de SEU al SAT. Sekve, laŭ tiu promeso la kasisto de SEU estus povinta sendi la monatan kvanton je la 1. januaro, tiel montrinte ke oni konsideras serioza sian promeson.

Nia Administranto informis nin, ke ĝis la 13. februaro li ankoraŭ **ne ricevis eĉ unu kopekon!** *Ni lasas al la legantoj juĝi pri tiu fakto!*

Ni tamen ne laciĝas klopodadi por atingi, ke la SAT-mono ne estu fortuŕnata per malnobla manovro de sia destino. Ni insistos denove k denove ĉe nia presejo en Lajpcig, por ke ĉi lasta per sia aŭtoritato k influhavo ĉe sovetiaj rondoj penadu eldevigi la transpagon de l' ŝuldata sumo al nia preseja konto.

* Rilate al la rezolucio el Lajpcig necesas aldoni jenan klarigon: En "I-isto" n-o 8 oni povas legi fanfarone prezentitan rezolucion de "Lajpziga SAT-rondo", kiu kondamnas la gvidantojn de SAT. Ni konstatas, ke samdate k samloke okazis 2 kunvenoj de SAT-anoj, el kiu unu kunveno akceptis rezolucion dirantan ĝuste la **kontraŭon** de tio, kio publikiĝis en la opozicia gazeto. Estas do simpla trompo k blufo prezenti la tendencan rezolucion iniciatitan de la "Ekrelo"-administranto Kampfrad kiel opini-esprimon de *la* "Lajpciga SAT-rondo"!

ANTAŬ TRIBUNALO PRO APARTENO AL SAT

En la urbo Ŝiaŭliai (Litovio) mi troviĝis en decembro 1930 antaŭ la milita juĝistaro en distrikta juĝejo. Antaŭe mi estis tenata tri monatojn en centra malliberejo por malfacilaj laboroj en la urbo Kaŭnas (Kovno), k poste provizore estis liberigata dank' al iu samideano, kiu garantiis por mi per monsumo. Oni kulpigis min pro aparteno al SAT kiel al kontraŭŝtata organizo k pro disvastigo de literaturo de suprenomita asocio, la gazetoj "S-ulo" k "Sennacieca Revuo". La juĝistaro konsistis el regimentestro, du oficiroj k du soldatoj. La sekretario-oficiro legis la kulpig-akton konsistantan el tri folioj, laŭ kiu 1. en j. 1928 mi estis ano de sekreta bolŝevik-komunista organizo *Sennacieca Asocio Tutmonda*, kies celo, kiel bone estas konate, estas per armita ribelo forigi en Litovio la ekzistantan sociordon. 2. En j. 1928 mi donis por legi al aliaj esperantistoj "Sen. Revuo"-n (n-o 4/5) el j. 1927, kie en artikolo "Homido" laboristoj estas vokataj manpreni batalilojn kun ruĝaj flagoj por ekribeli kontraŭ la ekzistanta sociordo.

Kiel atestanto de polica flanko donas sciigojn pri SAT ankaŭ estinta mia amiko, nuntempe UEA-delegito, Andrius Borkauskas. Poste parolas eksperto-tradukisto de esperanto, iu nekonata al mi s-o Domeikis, kiu klarigas, ke SAT ne estas komunista organizo, sed nur celas disvastigi inter lab. rondoj la internacian lingvon. La prokuroro montras, ke la artikolo "Homido" sufiĉe klare agitas inter laboristaro por renversi la kapitalistan sociordon k postulas por mi severan punon. Mia defendanto, advokato Vanclauskas, nuligis ĉiujn argumentojn de l' prokuroro k postulas plenan mian pravigon.

En miaj lastaj vortoj mi diras, ke ne ekzistas nuntempe en tuta mondo iu ŝtato, kie lab. esperantistoj estus punataj per malliberigo pro disvastigo de sia esp. literaturo, k ke estus malhonoro por la juĝistaro antaŭ la

---

Korekto. K-do Rössler (11 297) petas nin ĝustigi, ke la materialon por sia artikolo "La kapit. raciigo" (vd. n-on 331) li ĉerpis el "AIZ" (Lab. Ilustrita Gazeto).

M 10 Febr. 1931

tutmondo, se oni forprenus mian liberon pro tio, ke mi legas literaturon k aniĝas organizon, kies celoj estas ne politikaj, sed kulturaj. Post pli ol unuhora konsiliĝo la juĝistoj malkondamnis min. *(12 868)*

Respondo al SAT-ano 29, Nov-Jorko[1]

Nenie estas lando Ameriko, sed ekzistas kontinento kun tia nomo. Povas esti, ke iuj ne sufiĉe bone scipovantaj esp-on misuzas la vorton Ameriko anstataŭ Usono, aŭ Usonon anstataŭ Ameriko — tio dependas de la senco aŭ esprimotaĵo. Ankaŭ povas okazi, ke bona esperantisto (kiel ekzemple SAT-ano 29) ne informas sin sufiĉe bone pri sia propra temo. Amerika Federacio de Laboristaro *ne estas usona organizo nur* — ĝi estas *amerika* organizo, ĉar ĝi akceptus membrojn el la tuta kontinento Ameriko. Pro samlingveco nur kanadaj laboristoj, krom usonaj, estas en ĝi. Sed eĉ se kanadanoj havus sian propran organizon k nur usonanoj estus en tiu organizo, ĝiaj kreintoj estas la solaj, kiuj havis la rajton doni al ĝi ĝian nomon; provu retraduki "Federacio de Usona Laboristaro" en la anglan k vi trovos, ke eĉ vi ne rekonus ĝin.

Estas usonaj milionuloj, amerikaj k eĉ tutmondaj. Ekzemple Morgan, usonano, ne nur estas amerika milionulo, sed eĉ tutmonda. Se vi ne kredas, demandu la germanojn. Por la plej granda parto de usonaj civitanoj-kapitalistoj la amerikaj landlimoj ne ekzistas k ilia kapitalismo estas tutamerika; la etburĝoj estas, kompreneble, usonaj kapitalistoj.

Georgo Saville (SAT-ano 1092).

Ruĝa Spartakiado de R.S.I. en Berlin, 4—12-an de julio 1931

Dum 1921 estas fondita la Ruĝa Sporta Internacio (RSI), kun celo aktivigi k revoluciigi la laboristan sporton k fari, ke la *"ruĝaj sportuloj estu la soldatoj de la revolucio"*. Tio estas devizo de RSI. Sporto tute ne estas ilo por forgesi la ĉiutagan mizeron, ne, tute ne. Sporto estas ilo por plifortigi nin, por pli solidarigi la amasojn, por pli batali kontraŭ malamikoj de l' proletaro. Tiajn taskojn plenumis RSI dum sia 10-jara agado. Grandaj anaroj renkontiĝos nunjare al Spartakiado en Berlin. Sed ni esperantistoj devas helpi organizi, k tial ni starigis Esperantan Spartakiadan Komitaton, adreso: Berlin C 2, Dirksenstr. 42. Aŭ skribu rekte al Spartakiade-Komite, Berlin, Neue Friedrichstr. 79 a.

Gek-doj helpu al ni. Minimume interesu vian landan sportgrupon k skribu al ni. Raportu pri la stato de l' sportmovado ĉiufaka en via lando. *(3257)*

VEGETARA SEKCIO DE SAT

Transpreninte de K-do Walter la gvidon de l' Sekcio, mi konstatis, ke nur malmultajn nomojn entenas la listo de niaj anoj. Tial mi alvokas ĉiujn vegetaranojn en SAT grupiĝi en la Sekcio. Estas nia nepra devo fari tion en la kadro de SAT. Mi proponas, ke vi kolektiĝu ĉirkaŭ ĉefa peranto en la diversaj lingvoregionoj. Tia ĉefperanto por regiono estu elektata dum SAT-kongreso. Estu ankaŭ lokaj reprezentantoj. Tiu sistemo funkciu laŭeble jam ĝis la nunjara kongreso. Ĉiu pripensu mian proponon k siaflanke direktu siajn sugestojn k rimarkojn al suba adreso. Devo de ĉiu unuopa K-do estas fortiri lab. elementojn el neŭtralaj organizoj vegetaraj, vivreformaj, pacismaj aŭ sim. Se li mem estas ano en tia organizo, li eluzu la okazon por senvualigi la ŝajnan neŭtralon k resti en ĝi, ĝis li mem kapablas starigi grupon. Per la aparato de l' Sekcio ni devas priservi izolulojn, grupojn ktp. Sed tial necesas, ke ĉiu sekciano persone, aŭ per la peranto, informu pri sialokaj okazoj. Estu en daŭra kontakto kun la Sekcio. Tiel kreiĝos informservo, kiu devas fariĝi plej kara amiko k subteno nia por mondskala laboro. En ĝi speguliĝu via animstato, suferoj, volo al libero, al ŝanĝo de l' nuna stato; ĝi spegulu vian klasbatalkomprenon, montru la agmanierojn por forskui la perfort-potencojn. Krom la literatura helpo ankaŭ ne forgesu la . . . monan. Al mia peto disponigi tutan paĝon en "S-ulo" por la Sekcio ne konsentis la redakcio, sed esperigis nin en okazo de 12-paĝa amplekso de la gazeto. Ni varbu por "S-ulo", sekve por ni!

Atendante multvoĉan eĥon: La sekci-gvidanto *Kurt Klaps* (2421),
Danzig, Karpfenseigen 12.

[1] Vd. "S-ulo"n n-o 327.

NIA POŜTO

Literaturamanto. — Ni ja legis pri reapero de "Literatura Mondo" en diversaj gazetoj. Sed ni ne povas aperigi recenzon, tial ke la eldonantoj ne sendis al ni eĉ unu ekz-on.

Bumm. — Vian manuskripton ni sendis al la red. de "Jun. Paĝo". — *Red.*

9367. — Se ni sukcesis ricevi nian monon de CK SEU ni povus nun eldoni jarlibron, se ne, ni nur povos eldoni ĝin fine de la jaro.

Bonĉeff. — SAT neniun rajtigas kolekti monon por SAT. Se iu K-do konfidas la monon al iu persono aŭ institucio, tiam li faras tion je propra risko. Ni ŝatas la monon rekte ricevi. *Adm.*

KORESPONDADO

AŬSTRIO

— Samideanoj en Sovetio aŭ Francio, kiuj estas en la situacio serĉhelpi laboron por senlaborulo (lignaĵisto), bv. skribi al: Markus Lampl, Hart, 81-b, *Strassgang.*

BRITIO

— Laborista Esp. Klubo en Rhyl aranĝos tre baldaŭ ekspozicion por montri la valoron de esp. al la laboristaro. Bv. tuj sendi gaz., esp-aĵojn, L, PK, PI, ktp. el ĉ. landoj. Al ĉ. sendinto ni nepre resp. Adresu al: K-do J. F. Stone, 72 Grosvenor Avenue, *Rhyl.*

ĈEĤOSLOVAKIO

— Tiu, kiu sendas al mi prospektojn, se eble kun prezaro de aŭtomobil-leviloj (lastaj novaĵoj, ricevos de mi 5 belajn PI de nia urbo aŭ de ĉeĥoslov. naciaj kostumoj. Adr.: K-do Jan Pich, Jednotarska, 13, *Plzen-Letna.*

FINLANDO

Gek-doj, por eviti neakuratan funkciadon de SAT-aparato bv. noti la novan adr. de SAT-peranto (5095): K-do E. Mäntynen, Kaup. Talo-Viinikka-ovi, 32, *Tampere.*

FRANCIO

K-do Raŭl Melo, 7, str. Labat, *Paris (18),* dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj k interŝ. PM, kĉl. Mi resp. ĉiam rapide.

GERMANIO

K-do Walter Schmidt, Grasdorfer Str. 19/I, r., *Leipzig O 28,* kĉl, pri ĉ. temoj, PI, PK, bfl. Resp. garantiata.

— 10 K-doj dez. korespondadon kĉl krom Sovetio, L, PI. Adr.: K-do Karl Beckmann, Jägerstr. 4, *Schwerin i. M.*

— Gek-doj koresp. kun eksterlandanoj pri div. temoj. Resp. garantiata. Skribu al: K-do Julius Mathes, Sonnenstr. 1, *Freiburg i. Br.*

SOVETIO

— Studentoj de maŝinkonstrua teknikumo koresp. kĉl. Resp. garantiata. L, PK, PI, PM, fotoj, gaz., ĵurn. Adr.: K-do Griŝin, Radostnaja, 4, *Nikolaev,* Ukrainio.

5 SAT-anoj el grupo Wurgwitz (Dresden)

deziras korespondadon kun Gek-doj el ĉ. l. L, PK, PI, PM. Resp. gar. Adr.: Espero-grupo *Wurgwitz* (Dresden), Hauptstr. 26.

Geesperantistaro tutmonda!

Esp.-Grupo de Lidköping aranĝos internacian letervesperon la 13. marto. Sendu al ni PI, L, gaz. ktp. Ni garantias certan respondon. Adr.: K-do Erik Ahl, *Lidköping, p. r.* (Svedio).

Tutmondaj Gek-doj atentu!

Lab. Esp-ista Sekcio (LES) en Stonava festos aŭtune *"10-jaran jubileon de esperanto en nia vilaĝo".* Por montri valoron de esp. en tutmondo al nia publiko, ni petas ĉiujn Gek-dojn sendi al ni taŭgan materialon, PI, esp. gaz. ktp. por ekspozicio. Ĉiuj estos rekompencataj per respondo! Adreso: Jozef Balicki, *Stonava 198,* Silezio, Ĉeĥoslovakio.

Infanamikoj atentu!

K-do Jac. Hillesum, Reitzstr. 17, *Amsterdam,* koresp. pri ekzisto k estiĝo de ludejoj, sinokupo de urbestraroj pri infanoj. Detalaj informoj k skribaĵoj pri supre citita temo estas dezirataj. Same fotoj de ludejoj k ludĝardenoj.

Alvoko! — Nuntempe en Nordkaŭkaza revuo "Na Podjome" (eld. en Rostov/Don) okazas diskutado pri la romano de M. Ŝoloĥov: "La kvieta Don-o". Ĉiuj gelegintoj estas petataj sendi siajn kritikojn, precipe politikecajn, pri la verko (duvoluma) por aperigi ilin en la menciita revuo sur la paĝo: "Eksterlandaj gelegantoj pri 'La Kvieta Don-o'." Materialojn sendu al K-do A. Sidorov, Poĉtov. jaŝĉik 347 *Rostov/Don,* Sovetio.

Belgorod (USSR)

Mia kara Alĉjo! Mi estas tre malfeliĉa, ke vi ne skribas al mi. Kun zorgoj atendante vivosignon de vi: Via Injo.

NEKROLOGO

Mortiga apopleksio trafis la 29-an de januaro nian ĉiam silente laboreman 58-jaran SAT-anon K-don

JOHANO GRISAR

Imiti lian oferémon al nia movado, estu nia monumento starigota al li!

SAT-rondo Dortmund (Germ.).

ENHAVO

pago
Sklaveco en la 20-a jarcento . . . 161—62
"En okcidento nenio nova" . . . 162
Hispanio — ĝia evoluo de 1923 ĝis hodiaŭ . . . 162—63
La klasbatalo tra la mondo . . . 163—64
Pri la konfeso de Mikaelo Bakunin . 163—64
La kolektivigo en USSR laŭ Fedor Gladkov . . . 164—65
Sennaciula Liberpensula Paĝo . . . 165—66
Tra Esperantio . . . 166—68
Korespondado . . . 168

Presejo: Neudrag, Leipzig (Germanio)

M 1c Paul Gottgetreu, Herrenstr. 12
2209b